PANORAMO-INFO

Sciiga letero por la Esperantistaro en Saksio-Anhaltio

14-a jarkolekto 2005-3

19a ANABEL, la 22-an de oktobro 2005

Estu bonvena al 19-a ***Aŭtuna Najbara Aranĝo kun Borso de Esperanto-Literaturo (=ANABEL).***

Ni havos la kutiman lokon en la Fondaĵoj de Francke (Franckesche Stiftungen) kaj la kutiman programskemon:

9:00 alveno, eta matenmanĝo, kafo

10:00 promenado al proksimaj vidindaĵoj de Halle

12:00 tagmanĝo

14:00 prelegeto, kultura programeto

kafotablo kaj babilado ĝis la fino.

Tamen kelkaj atentigoj: per aŭto ne eblas veturi de Riebeckplatz al Franckeplatz laŭ rekta linio pro konstruado sur la strato. La tramoj ĉe Riebeckplatz ne funkcias pro konstruado: estos busoj. De la stacidomo prefere piediru. Se vi bezonas helpon dum la alveno, telefonu al la poŝtelefono de Jörg Gersonde: 0173-3750851.

Se vi havas pliajn demandoj aŭ volas kontribui al la programo, kontaktu nin. La kontaktinformoj estas sur la dorsa paĝo de la informilo. Ni ankaŭ ĝojas, se vi antaŭe anoncas kun kiom da personoj vi partoprenos. Tio plifaciligas al ni la organizadon de la aranĝo, dankon.

Jam en printempo la prezidanto de la FR Germanio Heinz Köhler distingis la laboron de la Bandoneo-orkestro-Halle kaj premiis ĝin per „Pro Muzika Plakedo.“ Tio orkestro jam ofte prezentis sin dum niaj ANABEL-aranĝoj, eble pro la laŭdinda „hazardo“ ke nia grupano Udo Birkner estas membro de la orkestro.

Bongratulon al la orkestro!

Baloto-Kvizo

Okaze de la frutempaj balotoj de Bundestag en Germanio, trovita en granda germana taggazeto.

Divenu la aŭtoroj de la sekvantaj citaĵoj.

1. La balota filozofio de la kandidatoj por la parlamento simple konsistas el tio, ke ili rajtigas sian maldekstran manon ne scii, kion faras si dekstra mano. Kaj tielmaniere ili lavas al si ambaŭ manojn.
2. Balotanto: persono, kiu havas la privilegion baloti por tiu homo, kiun por li elektis alia homo.
3. La malsaĝeco de la civitanoj en balottempoj sole estas interompita de la impertinenteco de tiuj, kiuj volas esti elektitaj.
4. Neniam svarmas tiom da mensogoj kiel post ĉaso, en milito kaj antaŭ balotoj.
5. Vian atenton dediĉu al ĉiu, vian voĉon sole al malmultaj.
6. Trompo, mensogo, falsa ĵuro – balotpermesoj.
7. Oni devas gajni la plimulton de la voĉoj por si mem – do: ne ofendu la stultulojn.
8. Balotbatalo: Rikante staras la politikuloj en el fokuso de la publikumo kaj preterkondukas la amastrafikon en multkolore ornamitajn sakstratojn.

La solvojn vi trovas sur la antaŭlasta paĝo.

solo

Raporto pri REVO

La 17-an de septembro okazis ĉijara **R**enkontiĝo **E**sperantista en **V**orlic**o**. La vetero surprizis nin per belega sunbrilo, kion oni ne povus esperi laŭ la antaŭaj tagoj. Eble pro timo pri malbona vetero nur 12 personoj kolektiĝis. La plej fora gasto J. Bender venis el Vurtembergo kaj biciklis jam la tutan semajnon tra la regiono Mezgermanio.

Bonŝance ni ne elektis itineron ĉirkaŭ la kastelo de Vorlico. Tie multaj vojoj estas baritaj pro konstrulaboroj por renovigi la domojn. Ankaŭ la alegoria labirinto ankoraŭ ne estas en montrinda stato. Ni iris tra la orienta parto de la parko. Tie ĝi ne hazarde aspektas kiel itala pejzaĝo, ĉar tie la princo Franz [pron.: Franc] (1740-1817) konservis siajn memorojn pri la vojaĝo al Italio en la jaro 1766. En Italio li konatiĝis kun Sir William Hamilton, kiu estis brita diplomato kaj vulkanologo. Kune ili grimpis sur Vezuvion. Pro tio princo Franz konstruigis (1788-1794) kopiojn de la vilao de sia amiko Hamilton kaj de la vulkano en la parko. Oni povas eniri la vilaon kaj admiri la valorajn dekoraĵojn. La kopio de Vezuvio funkcias (!!): per fumanta kaj ardanta fajro kaj fluigo de akvo eblas bildigi vulkanon, kiu ŝprucas lafon. Du semajnojn antaŭ REVO oni faris tiel por inaŭguri ĝin post longjara rekonstruado.

teatrejo sur la insulo de Vezuvio

Sur la insulo de Vezuvio estas krom la vilao Hamilton ankaŭ teatrejo kaj kopio de romia gimnazio. La lasta eble memorigas ankaŭ al la edukaj celoj de la princo. Li fondis la unuan instituton por instruistojn, kiun dum kelkaj jaroj gvidis la filizofo kaj pedagogo Johannes Basedow (1724-1790). Sub la Vezuvio estas kolumbario, templo de tago kaj templo de nokto. Ĉiujn instalaĵojn ni vidis la unuan fojon, ĉar post la jaro 1983 neniu vizitanto rajtis iri sur la insulon pro la danĝera stato de la tuta konstruaĵo (el naturaj ŝtonoj). De la Vezuvio oni havis belegan rigardon trans la lago de Vorlico al la preĝejo. Ĉar la tuta insulo havas formon de Kalabrio (suda Italio) ankaŭ la

markolo de Mesina (Scila kaj Karibda) kaj la insulo Sicilio ne rajtas manki.

Ni pluiris laŭ la kanalo de Georgo, kie troviĝas la Fera Ponto. Ĝi estas laŭmezura kopio de originalo en Shropshire en Anglio (tie trans la rivero Severn), sed ĉi tie en la parko ĝi mezuras nur kvaronon. Konstruinto de la angla originalo estis Wilkinson. Tiu duono de la legantaro, kiu de tempo al tempo bezonas razadon, certe scias pri kiu temas. Kiam la originalo estis konstruata (1777-1779), ĝi estis granda sensacio en la mondo (31 metrojn longa, tute el fero).

rigardo de Vezuvio

Fera Ponto

Alia ponto en la parko estis konstruita tiel ke veturante per boato sur la kanalo vi vidas sunon - unu dunono estas la ponto mem kaj la alia duono estas la spegulaĵo de ĝi en la akvo. Pro tio la ponto nomiĝas Sunponto kaj la kanalo Sunkanalo.

La parko enhavas multajn tiajn belajn surprizojn kaj ĉe multaj lokoj estas edukaj elementoj pri arto, tekniko kaj la diversaj vivmanieroj de la homo. Tio estas unikaĵo inter la multaj belaj ekzistantaj parkoj kaj unu el la kialoj pro kio la parko de Wörlitz estas Monda Heredaĵo laŭ UNESCO.

Sunponto

Tio estas malgranda priskribo de nur malgranda parto de la parko, kiu okupas pli ol 100 ha. En venonta jaro ni vizitos alian parton de la parko kaj eniros la Gotikan Domon, kie la princo preferis restadi kaj okupiĝi pri pomologio. (La kastelo servis ĉefe por prezentado – ĝin ni ja vizitis dum nia jubilea aranĝo en la pasinta jaro.)

La parko de Vorlico kaj la Esperanto-grupo de Halle atendas vin ĉe 22-a REVO en 2006.

jogo



Kiu tro bone vivas
tiu vivas malsane,

sed kiu vivas sane
tiu ne vivas bone.

Pli bone sen spegulo
en la domo, ol
ĉiumatene ektimi!



Kiu estis Ludwig Stur?

En orienta parto de la urbo Halle ekzistas strato kun nomo Ludwig Stur [pron.: Ludvig Ŝtur]. De tempo al tempo iu ajn turisto, sed ankaŭ Halle-ano, demandis min: *„kiu estis Ludwig Stur?“* Mi ne sciis respondon. Post kiam mi legis en gazeto, ke ĉijare okazos la 190a datreveno de lia naskiĝtago, mi serĉis en leksikono kaj trovis:
Ludwig Stur, naskiĝis la 29an de oktobro en Uhrovec ĉe Trenĉin en la okcidenta Slovakio, kiu en tiama tempo apartenis al Hungario. La ĝusta nomo de li estis Ludovit Ŝtur.
Ludovit Ŝtur laboris ekde 1836 ĝis 1843 kiel instruisto en Bratislava. La famkonata filologo merits pri la mezslovaka dialekto al skribolingvo kaj fondis la hodiaŭan version de la slovaka literatura lingvo per enkonduko de la nova fonetika ortografio. Per tio unuiĝis la slovaka popolo lingve, kulture kaj nacie, ĉar en la jaro 1851 ankaŭ la katolikoj konsentis, kiuj ĝis tiu tempo preferis la literaturan lingvon de Anton Bernoláka.
1847 Ludovit Ŝtur estis membro de la hungara parlamento.
1848 li gvidis la slovakan liberecan batalon.
Post la morto de sia frato Karol li zorgis pri lia familio en Modra (norde de Bratislavo). En tiu loko li skribis en la germana lingvo la libron „Das Slawenthum und die Welt der Zukunft“ („La slaveco kaj la mondo estonta“). Li ankaŭ estis kolektanto kaj eldonisto pri slovakaj popolkantoj kaj fabeloj.
Post kiam lezo dum ĉaso en la jaro 1855 Ludovit Ŝtur mortis en la 12a de januaro 1856 en Modra.

ugg

Pliajn informojn vi trovas ĉe http://stur.sk aŭ en Vikipedio. En Vikipedio la Esperanto-artikolo estas sufiĉe ampleksa kaj la angla tre ampleksa.

Solvoj de la Balota Kvizo

1. Karl Marx (1818 – 1883)
2. Ambrose Bierce (1842 – 1914); usaona verkisto kaj ĵurnalisto.
3. Emile Loubet (1838 – 1929), presidente de Francio de 1899 ĝis 1906.
4. Otto Graf de Bismarck (1815 – 1898)
5. William Skakespeare (1564 – 1616)
6. Anonymus
7. Alexander Sergejevič Puŝkin (1799 – 1837)
8. Rainer Kohlmayer (* 1940), universitata profesoro.

Rimarko: Rigardante la jarcentoj el kiuj devenas tiuj perceptoj – vi nun povas iomete grumbli pri la demando, ĉu la homo estas disponigita por lerni ion el sia historio.

solo

regulaj renkontiĝoj

Eo-grupo PANORAMO - Halle:
1-a mardo, 18.ooh: E.-Abderhalden-Str. 20
3-a mardo, 18.ooh: Bölbergasse
(restoracio "Zum Schwarzbrenner")
4-a mardo, 17.ooh: PIKo, informu vin

Eo-Gruppe Magdeburg:
ĉiu 2a mardo (ne en julio, aŭgusto),
Steubenallee 2

Eo-Klubo "Karapaco"
Zeitz: Dirk Bindmann, ✆+🖷 03441-273251
walden@t-online.de
Altenburg: kaiser-altenburg@t-online.de
✆ 03447-4012

eventoj

pliaj:
http://aliaflanko.de/kalendaro/
http://www.eventoj.hu

01.-03.10.2005 **Herzberg**
Pedagogiaj Tagoj
Esperanto-Centro Herzberg

09.10.2005 **Pirna**
Ĉeĥa-Saksa Tago
Norbert Karbe,
03501-773232, nokosaksio@tiscali.de

22.10.2005 **Halle**
ANABEL (Aŭtuna Najbara Aranĝo kun Borso de Esperanto-Literaturo), **E-grupo Halle**

28.-30.10.2005 **Neubrandenburg**
40a Semajnfina Esperanto-Seminario
Werner Pfennig, 0395-4221398
werner.pfennig@t-online.de

03.11.2005 **Herzberg**
Interkultura vespero
Esperanto-Centro Herzberg

05.-08.12.2005 **Herzberg**
Esperanto-kursoj laŭ tri niveloj
Esperanto-Centro Herzberg

adresoj

DEB - Deutscher Esperanto Bund
Immentalstraße 3, 79104 Freiburg,
✆ 0761-289299, Info 0180-esperanto (-3773726)
gea@esperanto.de http://www.esperanto.de

UEA - Universala Esperanto Asocio
Ĉefdelegito por Germanio:
d-ro Wolfgang Schwanzer,
Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz
✆ 06136-46232, http://www.uea.org

SAT - Sennacieca Asocio Tutmonda
Peranto por Germanio: Jiri Proskovec,
Heimbaustraße 10, 44143 Dortmund
proskovec@aol.com

ELSA - E-Ligo Saksio-Anhaltio
Jörg Gersonde, H.-Wäschke-Str. 31,
06366 Köthen, ✆ 03496-558517
joerg.gersonde@esperanto.de

E-Grupo "PANORAMO" Halle
Siegfried Linke, Fischerstecherstr. 23,
06120 Halle, ✆+🖷 0345-5500348,
halle-saale@esperanto.de
http://www.esperanto-halle.de

E-Grupo Magdeburg
Edith Plümecke, Simonstraße 15,
39114 Magdeburg, ✆ 0391-8117421
DDungert@t-online.de
http://www.beepworld.de/members75/esperanto-dungert

E-Grupo Leipzig
Werner Geidel, Karlsruher Str. 5 d
04209 Leipzig, ✆ 0341-4118577

Esperanto-Centro Herzberg
Peter Zilvar, Grubenhagenstr. 6,
37412 Herzberg, ✆+🖷 05521-5983
esperanto-zentrum@web.de
http://www.esperanto-zentrum.de

Literarurdienst "ESPERO"
Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18
27333 Schweringen, ✆+🖷 04257-983223
RoBo.ESPERO@t-online.de

Bücherdienst/Libroservo
wolfgang.schwanzer@esperanto.de
http://www.esperanto-buchversand.de
✆ 06136-46232

PANORAMO-Info

Herausgegeben von der Esperanto-Gruppe „PANORAMO" Halle,
fina redaktoro: Jörg Gersonde, H.-Wäschke-Str. 31,
06366 Köthen, 03496-558517, joerg.gersonde@esperanto.de
Bankverbindung: August Grosch, Kto.: 480 144 352,
BLZ 800 537 62, Stadt- und Saalkreissparkasse Halle